# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

La kongreso 55ª Hispana

## Buñuel relegita






# La tajfo de Murcia

Nº 30

Aprilo/Junio 1996

# Kajeroj el la Sudo

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**

*Prezidanto:* ***Martín Bustín Benito.***
*Apartado de Correos 4143*
*E03080 ALICANTE (Hispanio)*

*Secretario:* ***Jesuo de las Heras Jiménez,***
*Apartado de Correos 4461*
*E30080 MURCIA (Hispanio)*

*Kasisto:* ***José María Bernabeu Franco***
*Gral. Primo de Rivera, 8*
*E-03369 Callosa de Segura,*
*ALICANTE (Hispanio).*
***Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la nº 28.09.722.429 en libreta de Caja Postal. Oficina postal 0412. Sen aldona kosto.***

*Faras la Kajeron:*
*Provkorektanto:* **José Pina Tuells,**
*Administra laboro:* **Juan Antonio Cabezos Martínez,**
*Redaktoro:* **Jesús de las Heras Jiménez.**

**Grava noto.-** Kiam vi pagos vian kotizon, sendu fotokopion de la pagilo al Sº J. M. Bernabeu, Apartado 90, 03360 Callosa de Segura, Alicante.

**Kovrilo:** ***Tristana*** kaj R. Selten.

# Enhavo:

Redaktore: ........ 3
Informoj de la Prezidanto ........ 4
**Eseo monatotria** Kamarado kinista Ludoviko ........ 5
**Labormondo:** Ĉu oni povas instrui en Hispanio? ........ 8
**Lingve parolante:** La uzo de lia kaj sia laŭ la regulo de mimoismo ........ 9
**Literatura angulo** *Valo, Ne nur por geprofesoroj...* ........ 11
**Debatindaĵoj:** K.F.D. ........ 13
**La 55ª Hispana Kongreso de Esperanto** ........ 14
La hispana kaj la angla ........ 15
**Ekonomio:** Planediĝo ........ 17
Nobelpremiita vizito al Murcia ........ 19
**Atestoj**:Post 10 jaroj ........ 21
**LastPaĝe:** La tajforegno de Murcia ........ 23

**Ni ne korespondos** pri *ne-petitaj* artikoloj.
Tamen, ni klopodos publiki ĉiujn interesajn kontribuaĵojn.

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecu la aŭtoroj mem, ne la redakcio.*



# Redaktore:

Kiel vi eble scias, la redaktoro de **Kajeroj el la Sudo** ŝanĝis. Ambaŭ samideanoj *Miguel Fernández* kaj *Antonio Marco Botella* jam ege kontribuis al la agado de laboristoj hispanaj,kaj ni klopodos konservi la nivelon de la revuo tiom alta kiom ili faris, kvankam ĝi ne estos facila afero.


Ĉi monate, ni informos vin pri la venonta kongreso de HEF ĉe Murcia, la urbo kie nian revuon oni eldonas ekde nun. Samideano Francisco Miguel Muñoz Garre ege kuraĝas, kaj ni legos pri lia agado en la paĝo 14ª, kie vi trovos la programon de la kongreso.Aliaj gravaj temoj estas vizito de nobel-premiito al ni (pp. 19), kaj terura atesto de kievänino (pĝ. 21).

Ni rakontas niajn opiniojn pri la libroj kiuj atingis nian redakcion dum la pasinta monatotrio. Eble vi trovos ilin utilaj, kaj se vi ne konsentas, eble vi povos sendi viajn impresojn al ni, komenci kaj daŭrigi debatojn pri ili. La politiko de la revuo ne ŝanĝis, sed mi petas, ke debatoj ne personiĝu. ***Kajeroj el la Sudo*** volas esti la kunigilo por laboristoj ene kaj malene de Hispanio. Ĝi ne estas Hispana magazino, eĉ se oni faras ĝin en Hispanio. ***Kajeroj el la Sudo*** volas esti *sennacieca revuo nenaciisma*, kaj se laboristoj volas defendi siajn vidpunktojn -eĉ se estas naciismaj-, ili estas kore invitataj por fari tion. Kompreneble, ĉiuj vidpunktoj estos akceptataj, kaj se ni volas konservi la rajton por skribi, ĉiu opinianto devas respekti unu al la aliaj. Ne estas tio, kion mi kutime vidas eĉ en esperantistaj revuoj, sed nia revuo volas esti revuo por kaj de homrespektemuloj. Kaj por garantii ke oni povas legi ĝin pace, personaj atakoj devas esti malpermesitaj. Libereco por opinii estas garantiita, sed libereco por ofendi ne estas ebligota.

***Kajeroj el la Sudo*** ankaŭ enhavas *kulturajn* artikolojn kaj eseojn monografiajn. Tiun ĉi monatotrion mi mem prezentas resumon pri Luis Buñuel, debatinda filma direktoro; kio tre taŭgas en la centjaro de Hispana Kino! Sed kompreneble la revuo estas malfermita por viaj interesaj kaj gravaj eseoj pri kio ajn vi volas diri al la laborista esperantistaro. Se estas tro longa kaj ni ne plu havas tiom da spaco kiom dezirite, ni rajtos malplilongigi vian eseon, sed ni klopodos kontakti vin antaŭ ol fari tion.

Kaj laste, mi ŝatus oferti omaĝe tiun ĉi unuan kajeron, kiun mi faris ame kaj kun la helpo de miaj amikoj, al la emeritaj redaktoroj, sinjoroj Antonio Marco Botella kaj Miguel Fernández, kiel agnoskilo de iliaj klopodoj por gardi nin, hispanajn laboristojn, ĝis nun, informitaj kaj ilustritaj. Dankon, samideanoj!

*La redaktoro*



# Informoj de la Prezidanto

En la lasta Asembleo de HALE okazinta en Salou la 11an de Novembro de 1995, la kvin partoprenantoj decidis pri pluraj gravaj aferoj koncerne nian Asocion. En la 28a nro de ***Kajeroj el la Sudo*** vi ĉiuj povis legi pri la rezultoj de la debatoj.

Sen deziro polemiki mi donos mian opinion pri la aliĝo de HALE al HEF, ĉar la sekretario de de la Asembleo skribas: *Temis nur pri konveneco, ĉar la prezidanto López samtempe rolis kiel HEF sekretario kaj evidentas ke li ne povis esti en du lokoj samtempe.* Mi estas certa ke la sola kulpulo ne estis la tiama prezidanto, ĉar sia sola decido ne sufiĉis por aliĝigi HALEn al HEF se ne estis konsento de aliaj kamaradoj inter kiuj estis kelkaj kiuj ankaŭ okupis gravajn postenojn samtempe en HEF kaj HALE. Plie, la kontraŭstatuta decido ne estis akordita en Asembleo de HALE, kaj nur tiuj kamaradoj kiuj prenis tiun decidon sciis pri ĝi, kaj la plejmulto de HALE membroj sciis nenion pri tiu malfeliĉa afero. Kiel dirite *Temis pri konveneco de...* HEF.

Mi konstatas ke nia Asocio ankoraŭ lamas en ĝia organizado. Estus bone kompletigi la estraron per vicprezidanto, kaj respondeculo pri libro servo. Ankaŭ ni devus anstataŭi kiel sekretario nia kamarado Jesús de las Heras Jiménez, kiu nun prenis la taskon redakti ***Kajeroj el la Sudo***. Tuj postenoj ne donas multe da laboro ka j sufiĉos iom da bonvolemo por ke nia HALE povu normale antaŭeniri. Do, mi alvokas vin ĉiuj por helpi nian Asocion. Ne timu esti pluraj, ĉar ĉiuj helpoj estas necesaj.

Ankaŭ la rilatoj inter disaj membroj ne estas oftaj, por ne diri tute nulaj. Mi pensis ke referendumo povus estigi ligon inter la membraro, kaj mi tion proponis sed la tiama redaktoro de ***Kajeroj el la Sudo*** en la 23an numeron respondis tre agreseme al mia propono *okazigi referendumon simile kiel tiuj de SAT por agi pli demokrate* skribante: *la hispanaj anti faŝistoj ne facile forgesas ke diktatoro Franko kaj aliaj faŝistaj reĝimoj uzis tiun sistemon por legitimi maljuston, kaj tiranion...* Sed okazas, ke en la Statuto de Hispana Asocio de Laboristaj Esperantistoj, en ĝia 9a artikolo estasskribite: *Se oni ne trovus la adekvatan lokon por okazigi tiun Ĝeneralan Kunsidon, la estraro organizos Referendumon konsistantan el voĉdonilo, per kiu ĉiu membro voĉdonos por aŭ kontraŭ la listo de proponitaj estraranoj.* Inter la kunsignantoj de la Statuto de HALE troviĝas la tiama redaktoro de ***Kajeroj el la Sudo***. Komprenu kiu povu.

Mi daŭre opinias ke referendumo estos pli demokrata ol decidoj en Asembleo kie estas malmultaj, kaj ĉiam la samaj partoprenantoj.

La membroj kiuj ankoraŭ ne havas la Statuton de HALE povas ĝin demandi al mi. Tre volonte mi ĝin sendos.

Mi esperas, ke miaj informoj klarigis kelkajn aferojn kiuj ĝis nun restis ***mallumaj*** kaj mi esperas estonte nur informi pri la sukcesaj atingoj de HALE.

Kamaradece al vi,

*Marteno*

# Eseo monatotria



## Kamarado kinista Ludoviko

*Ĉu subrealo taŭgas pli ol realo?*

*Jesuo de las Heras*

Mi jus vidis filmon *Belle de Jour*, kaj trovis ĝin tre interesa kaj bela. Mi interesiĝis pri ĝia direktoro, kaj trovis, ke Luis Buñuel povus esti *SAT-ano*, ĉar li filme kontraŭbatalis Eklezion, burĝaron kaj faŝismon. Tion farante, li elpensis kaj ekfaris la *subrealismon* filman, tiel donante al ni la ŝancon por pripensi siajn filmojn multe. Li majstris silentan kaj malsilentan kinojn, dokumentajn kaj novelajn filmojn. Tamen, siajn plej bonajn filmojn li faris post kiam li estis sepdekjaraĝa!

La infaneco de Luis Buñuel disvolviĝis en Calanda, provinco de Teruel (Hispanio), kaj la etoso estis, laŭ li, *mezepoka*. Kiam li estis sesjaraĝa li komencis studi ĉe *jezuita* lernejo, kie li travivis edukan sistemon datumitan je la 18-a jarcento. Tio faris lin ribeli kontraŭ religio. Ankaŭ influis lin lia estado en la madrida Universitato (ekde 1917), kie li konis la *peñas* (tipaj amikaroj), kaj tiel li konis *al Federico García Lorca* kaj *Rafael Alberti*. Ili estis kerno de *antaŭvangardismaj* tendencoj, kiu nomiĝis en Hispanio *ultraísmo* kaj *creacionismo* (preterismo kaj kreismo). Kvankam Buñuel akceptis ambaŭ kurentojn kulturajn, li kritikis siajn amikojn ĉar ili ne tranĉis tradiciajn influojn.

Ludoviko Buñuel iris al Parizo , kaj kiam li vidis **Der müde Tod** (La tri lumoj), filmon farita de Fritz Lang je 1921, tiu diris al li por kio li venis en la mondon. Lin oni prezentis *Jean Eptstein*, kiu estis fama franca filma direktoro, kaj komencis labori por li, tiel eklernante la metion filman. Lia estro zorge avertis lian "*subrealismajn emojn*".



*Andaluza hundo, 1928*

*Kvankam Ludoviko ne ŝatis la poemlibron Platero y yo, li iam diris, ke la andaluza hundo ne estis Juan Ramón Jiménez, nek García Lorca. Ĝi estis libro de poemoj kiujn li mem skribis junule...*

En la jaro 1928 li faris la faman filmon **Un chien andalou** (andaluza hundo), kune kun la fama pentristo *Salvador Dalí*, kaj la filmo baldaŭ estis adjektivata ***subrealisma armilo*** kontraŭ la burĝaro kaj *antaŭgvardio*, kaj lia kontribuaĵo tiam estis pligravigi la enhavon kaj ne la formon. Du jaroj poste, li faris ***L'age d'Or*** (La ora aĝo), kiu gajnis multe

da mono por li, kaj ankaŭ portis kontrakton kun MGM, sed li renoncis post li vizitis Hollywood-n. Anstataŭ, li revenis en Hispanion kaj filmis en 1932 ***Las Hurdes: tierra sin pan*** (Las Hurdes: lando sen pano), kie oni vidas la malbonon de la lando tiama. Li filmis tion kun la mono kiun amiko gajnis en loterio kaj la kamero kiun alia amiko lin pruntedonis. Ĝi estis objektiva kulturfilmo pri malproksima, malriĉa parto de Hispanio, kaj ĉar ĝi kritikis tiel forte la eklezion kaj ŝtaton, oni malpermesis la filmon en Hispanio. Sed ekde tiam Buñuel atingis sian etoson, en kiu realismo donis la kuntekston atingeblan por sian estetiko kaj subrealisma kaj etika kodo.



*Viridiana, Jorge kaj Ramona ludas kartojn*

Luis Buñuel ne filmis ĝis 1947 denove. Li studis la kinan mondon kaj manieron fari filmon dum 14 jaroj, kvankam li laboris por Paramount Pictures de 1933 al 1935 sondonante filmojn en Parizo, kaj poste por Warner Brothers en Hispanio. Kiam la Hispana Milito ekis en 1936, li filmis ***España leal en armas*** (fidela Hispanio batalante), kiu li finis sekvontjare. En 1938 li vizitis Hollywoodon denove por helpi fari du pluajn kulturfilmojn, kaj li devis resti tie, ĉar la ribelistoj prenis povon hejme. Tiam li laboris ĉe la Muzeo de Arte Malnova de Neo Jorko, tradukante filmojn en la hispanan por Sudameriko. Tiam fia MacCarthy komencis sian *ĉasado de sorĉistinoj* kaj oni rezignigis lin de sia posteno ĉar oni denoncis, ke li estis komunisma homo (verŝajne Dalí denuncis lin). Estas ironie, ke li laboris por la armeo de Usono ĝis 1944, kiam Warner Brothers rekontraktis lin por fari hispanajn versiojn de ĝiaj filmoj.

En 1946 li ekloĝis en Meksikio, kie li faris siajn *manĝaĝajn filmojn* (tio estas: filmojn por gajni monon por manĝi, kiel li kutime diris). Li ankaŭ lernis la filman metion. Li faris 20 filmojn ĝis 1960. Li disvolvis propran stilon, ne fidante specialajn efektojn, li atingis apartan kodon ikonan kiu faras la rigardanton travidi la imagon. *Nazarín* estas filmo farita dum tiu ĉi periodo.

En 1961 hispanaj aŭtoritatuloj invitis lin fari filmon en Hispanio. Li filmis *Viridiana*n sub la rigardo de la censoristoj de Diktatoro Francisco Franco (pron. fransisko franko), kaj ili nur farigis lin ŝanĝi la lastan scenon: anstataŭ Viridiana frapu la pordon de sia kuzino, ŝi devis eniri lian ĉambron kaj ludi karton kun li kaj la servistino. Tamen, tiu fino estas pli sugestia ol la antaŭa... Sed poste, li portis la materialon al Parizo kaj remuntis la tutan filmon, kaj prezentis ĝin en la *Festival de Cannes*, kie li obtenis la *Oran Palmon*. Ĉar la nova montaĵo, *Viridiana* iĝis atako kontraŭ Katolikismo (Viridiana), Burĝismo (Jorge) kaj *Hidalgismo* (don Jaime), kaj tial la filmo estis malpermesita en Hispanio, kaj ankaŭ en Italio. La filmo -kiun oni montris en la dua ĉeno de la Televido Hispana lastfoje je la 5-a de februraro de 1996- kontrastis la malnovan rolon de la *kavaliro hispana* (Don Jaime, pron. ĥajme), la troa religiemeco de Viridiana -lia nepino- kaj la pragmatismo de la filo, (Jorge, pron. ĥorĥe).

Post *Viridtana*, Buñuel laboris ĉefe en Francujo, kie liaj filmoj estis plej komprenataj, kaj li disvolvis tute lian subrealisman estetikon. Li filmis tie *El Ángel Exterminador* (eksterma anĝelo, 1962), *Journal d'une femme de chambre* (taglibro de ĉambristino, 1964), *Simón del desierto*

(Simono de la dezerto, 1965), *Belle de Jour* (Belulino de tago, 1967, en kiu la limo inter realo kaj fantazio ne estas tute markita), *La Voie Lactée* (la Vojo Lakta, 1969, en kiu du pilgrimoj diskutas pri katolikaj herezoj, kiujn oni vidas laŭvoje), *Tristana* (1970, laŭ homonima novelo de Benito Pérez Galdós, kiu fakte estas daŭrigo de *Nazarín*), *Le charme discret de la bourgeoisie* (La diskreta ĉarmo de la burĝaro, 1972, kiu ricevis Oskaron de Holywood), *Le Fantôme de la liberté* (Fantomo de libereco, 1974, la plej *haleana* filmo), kaj *Ce obscure object du désir* (tia malklara objekto de deziro, 1977), en kiu du aktorinoj -Ángela Molina kaj Carole Bouquet ludis la saman rolon. Fakte la aktorino plejgrava de la filmo devis esti Maria Schneider, tiam fama pro *The Last Tango in Paris*, sed ŝi kaj Buñuel ne kunlaboris bone, kaj tial li anstataŭigis ŝin per la du aktorinoj, por montri ke rolo gravas pli ol *stelinoj*.


*Malklara deziro*

Ekde ĉiam la plej popolaj inter la filmoj de Luis Buñuel estas *Viridiana, Tristana* kaj *Ce obscure object du désir*. Tamen, miaj preferataj estas *Le fantôme de la liberté* kaj *La voie lactée*. La unua, ĉar la nura grava aktoro estas la kamero, kiu rakontas etajn detalojn pri diversaj personoj kiuj pruvas, ke libereco estas nur ene de nia menso. La filmo komencas kun pa-fado de hispanaj *patriotoj* kiujn mortigis lastcentjare francaj soldatoj, kaj kiam li mortis li kriis *Vivu la ĉenoj*. Post tio, oni vidas la fama rakonto de Gustavo Adolfo Bécquer *El beso* (la kiso, unu el legendoj en *Rimas y leyendas*), sed kun alia fino.


*La forgesitoj (1950)*

Kiam ni jam estas komforte vidante deknaŭcentjara ra-konto, oni vidas, ke servistino legas la rakonto al kolegiino ĉe parko, dum la infanoj ludas. La tuta filmo portas nin el rakonto en rakonto, ĝis la neatendita, abrupta fino. Buñuel diris, ke libereco ne ekzistas, sed estas nur ideo, kiun oni havas, kaj ekzistas nur kiel fantomo: ĉiuj ni parolas pri ĝi, sed neniu iam vidis ĝin.

Mia alia preferita filmo estas *Lakta Vojo*, kie la libereco estas leĝo denove. Du pilgrimoj, Jean Duval kaj Pierre Dupont, iras el Francio al Santiago de Compostela (nordokcidenta parto de Hispanio) sekvante la konstelacion Lakta Vojo aŭ *Vojo de Jakobo*, kaj ili trovas multajn personojn laŭvoje, kiuj faras ilin paroli pri religiaj faktoj kaj herezoj: Jesuo infana, la apostoloj, la jansenoj, ktp. Finfine, ili atingas Santiagon, kaj trovas putinon, kiun ili konfesas siajn verajn motivojn por viziti la apostolan urbon.

Mi konkludas dirante, ke la tuta filmaro de Luis Buñuel estas monumento al libe-reco de penso, sed oni devas ***legi*** la filmojn, ĉar ne estas novelaj filmoj, sed (kiel li kutime diris) poeziaj. Oni devas serĉi internan mesaĝon en ĉiu filmo de Buñuel. Li asertas en lia unua filmo jam en 1929 ***-Un chien andalou-*** ke oni ne devas vidi sian kinon pere de kutima okulo, kaj tial li persone sekcias okulon -Luis Buñuel mem rolas la scenon-. Kio gravas ne estas realo, sed subrealo en liaj filmoj, kaj estas tre sana ekzerco vidi la filmoj de Luis Buñuel kaj pripensi kion li sugestas nin.


*Viridianaj almozuloj*



# Labormondo

## Ĉu oni povas instrui en Hispanio?

Ene de unu monato mi legis du komdamnojn pri civila respondeco de instruistoj kaj ambaŭ estante tute malsimilaj je la supozoj, tute similis la rezultoj.

La unua estis novaĵo nacia, ĉar lernejestro de E.G.B. (baza ĝenerala edukado) estis kondamnita pagi 120 milionojn da pesetas. Kaj la faktoj okazis ekster lernejo kaj la lerneja horaro:

En lernejo kun transportilo por geinfanoj, aŭtobusoj venas je la 8:25 matene, sed klasoj komencas je la 8:45. Estas, tial, dudek minutoj inter la alveno de la busoj kaj la komenco de klasoj. Kiu patro ne konsentus la decidon de la estro por malfermi la pordon de la lernejo por ke geinfanoj sepjaraĝaj ĝis dekdujaraĝaj povu ludi en la ludejo? Mi opinias, ke ni ĉiuj samopinias kun la estro, ĉar gardi la lernejon fermitan kaj lasi centoj da infanoj atendi sur la trotuaro kaj la strato ĝis la lernejo estos malfermita povas kaŭzi akcidentojn.

La lernejo estis malfermita, sed kelkaj infanoj ne ludis tie, sed en falita domo apude de la lernejo; kaj domaĝe muro falis sur infanon. Siaj kunludintoj portas lin al alia loko, kaj sekve vundas lin tiel, ke li handikapuliĝas.

La defendanto de la instruisto argumentas, ke la akcidento okazsis ekstere de la lernejo antaŭ la komenco de klasoj, sed la juĝisto konsideris, ke kiam la lernejestro ordonis malfermi la lernejon, li alprenis gardon pri la geinfanoj, kaj sekve civilan kaj punan respondecojn derivitajn de la gardo de la infanoj. La juĝisto komdamnis, deklarante ke devis esti gardado en la ludejo por ke la infanoj ne eliru aŭ ŝanĝi la horaron por ke ĝi eniĝu la venon de la aŭtobusoj. Li kondamnis civile firmaon Winterthur ĝis la limo paktita en la poliso, kaj la instruiston por la diferenco kaj solidare al la *Generalitat*, tio estas, okaze ke la instuisto ne havus propraĵojn, la Ĝeneralitato devus pagi. Kiu lernejestro aŭ patro ne estus aginte same? Kiu estus rifuzinte malfermi la pordon de la lernejo, lasinte la etajn infanojn sur la troruaro? Tamen, la lernejestro estis kondamnita.

La alia afero okazis en Murcia, kaj ankaŭ estis sur niaj televidaj ekranoj. La faktoj okazis en la lernejo, kaj estis ekster la klasaj horoj. Infano ĵetis kalkon al alia infano, kiu sekve perdis okulon. La aktivaĵo estis aprobita de la Lerneja Konsilio. La instruiston oni ne kondamnis pune, sed civile, kaj li devis pagi kelkajn milionojn.

En ambaŭ okazoj la misfaraĵoj estas ekster klaso, ambaŭfoje instruistoj agis bonintence, kaj ambaŭfoje ili devis pagi kelkajn milionojn.

Eĉ se la Ĝeneralitato pagas, eĉ la se la Ministerio pri Edukado kaj Scienco pagas, kiu pagos al la du instruistoj por malgajajn tempojn kiun ili vivis?, por timo, por kolero? Bedaŭrinde, neniu pagos. Kvankam la viktimoj havis stipendion por sia doloro, ĉu ili estus pagitaj pli por alpreni pli grandan respondecon? Bedaŭrinde, ne. Por eviti akcidenton kaj, la alia, por voli aktivvaĵojn aprobita de la Lerneja Konsilo, ili nur obtenis malgajaĵon, malfarton, sensonĝajn noktojn.

Finfine, per tiu kaj aliaj similaj kondamnoj, geprofesoroj ne volas alpreni respondecon, ĉar neniu pagos nek dankos tiun aktivaĵojn, kaj ankaŭ ili devos pagi por ĉio difektita.

*Juan Antonio Cabezos*

# Lingve parolante...

## La uzo de **lia** kaj **sia** laŭ la regulo de mimoismo

Bernard Golden



### Ĉu lia aŭ ŝia?

Legu la sekvajn du frazojn kaj decidu, ĉu ĝi devas havi la refleksivan formon **sia**.

1. *Tuj poste k-do Antonio Marko informis la asembleon pri la fino de sia verko pri la Historio de la HIspana Laborista Movado...* (La Redakcio, ***Kajeroj el la Sudo***, 28, 1995, pĝ. 5)
2. *Per flua, facile komprenebla rakontistilo, la aŭtoro defiligas sub la lenso de lia aŭtoritata rezonado, la plej gravajn eventojn okazintajn en nia terglobo* (***Boletín de HEF***, 323, 1995, pĝ. 29; el recenzo verkita de Vicente Hernández Llusera).

Rimarku,ke la strukturo de ambaŭ frazoj estas identa. Temas pri aŭtoroj (la subjektoj de la frazoj), kaj jen pri *rezonado* jen pri *verkoj* de la respektivaj aŭtoroj.

### Kontrasto inter norma kaj anomalia lingvouzoj.

En la internacia Esperanta normlingvo *verko* kaj *rezonado* rilatas al la subjektoj de la frazoj, do la poseda adjektivo devas havi la refleksivan formon *sia*, kies funkcio estas resendi al la subjekto. Sekve, frazo 1 estas ĝusta, 2 estas erarhava. Nun komparu la sekvajn du frazojn, ambaŭ el la plumo de la sama aŭtoro, Luis Mimó Espinalt:

3. *...li estis gvidata nur de sia eksterordinara lingva intuicio, t.e., de sia logika sento, sur kiu baziĝis la majstrecon de lia stilo* (**Esperanto kaj ĝia analiza skolo**, 1982).
4. *... li estis gvidata nur de lia eksterordinara lingva institucio* [tiele!], *t.e. de lia logika sento, sur kiu baziĝos la majstreco de lia stilo* (***KAE informilo***, 9, 1995, pĝ. 4).

Kial okazis, ke la sama perono uzis malsamajn adjektivojn en identa kunteksto?

### Bizantisma klarigo

Post kiam mi atentigis la redakcion de ***KAE-informilo*** pri tiu anomalio, estis publikigita en n-40 12, 1995, sur paĝoj 4 kaj 5, komplikan rezonadon celantan pravigi la gramatikan reviziismon de Mimó surbaze de jena regulo formulita en liaj libroj pri la ***Regula Esperanto neniam estas uzebla, rilate al propozicia subjekto, la refleksivo sia post la prepozicioj de aŭ el en genitivo***. Rikardo Ŝulco (Richard Schultz), la korifeo de la Analiza Skolo, papage kaj

insiste ripetadis tiun dogmeron de la mimoismo, kaj la rezulto estis polemika diskuto kun gramatikisto Miroslav Malovec.

## *La malbeno de la gramatikumado.*

Konstanta plago en Esperantujo estas la agado de ĉiuspecaj harfendantaj gramatikumantoj kaj pseŭdoerudiciuloj pri lingvaj aferoj, kiuj, sidante en siaj mucidaj kabinetoj, elcerbigas arojn da komplikaj reguloj por ilustri siajn teroriajn vidpunktojn pri la strukturo kaj evoluo de Esperanto. Ili neniel kapablas enkapigi jenan gravan averton: ju pli da elektebloj ekzistas en lingvo inter diversaj vortformoj, des pli malfacila estas lernado kaj uzado de la lingvo. Ekzemple, ne estas kontesteble, ke uzo de la refleksivo estas insida stumbligilo por lernantoj kaj uzantoj sur ĉiuj niveloj de lingvoalproprigo. Pro tio, Mimó paŝis sur danĝera tereno, kiam li arogis al si diktatorece postuli malsimpligan modifon. Eble oni povas apliki mimoismajn regulojn ĉe la skribotablo, sed estas tute alia afero, kiam oni staras surpiede kaj devas buŝe esprimi siajn pensojn en flua interparolado. Tiam la reguloj servas nur por obstakli la glatan kunagadon de menso kaj lango.

## *Kiu apogas la mimoismanojn?*

Jam de pluraj jaroj la sekvantoj de Mimó, inter kiuj troviĝas ankaŭ la adeptoj de la Analiza Skolo de Rikardo Ŝulco, provis disvastigi siajn heterodoksajn doktrinojn pri la strukturo de Esperanto. Tamen, nek la Gramatika Sekcio de Akademio de Esperanto, nek eminentaj esperantologoj, nek la t.n. bonaj aŭtoroj apogas la instruojn de la mimoistojn kaj ŝulcistoj, kiuj estas arogante altrudataj kiel superlogikaj dogmoj. Ili misefikas por semi konfuzon inter la ordinaraj membroj de la Esperanta lingvokomunumo kaj neniel estigas pozitivan etoson por progresigi la lingvon. Dum la lastaj jaroj la senĉesa kritikado kaj denigrado de kontraŭuloj fare de Rikardo Ŝulco senbridigis amarajn prilingvajn disputojn, kies eĥoj plimalpli frue formalaperos en la abismon de forgeso.

## *For la lingvan reviziismon de Mimó!*

La metodo de Mimó ne povas havi finon. Post regula uzo de la refleksiva adjektivo en 1982, li dediĉis sin al profunda reviziado de sia pensado pri gramatikaĵoj kaj decidis alkonformigi ĉiujn siajn antaŭajn verkojn. Unu el la rezultoj estis, ke la poseda adkektivo *lia* anstataŭis *sia* en la sama frazo pli ol jardekon poste. Kiel aspektus Esperanto hodiaŭ, se Mimó ankoraŭ vivus kaj daŭrigus siajn ŝajne nebremseblan reviziemon? Ĉu iu ajn individua esperantisto rajtas atenci vivantan lingvon, kiu ne plu estas eksperimentaĵo sed propraĵo de socia komunumo? Por sobre pensantaj esperantistoj la arbitra modifado fare de Mimó estas netolerenda.

### Novaĵoj

La Belgia Laborpartio okazigos inernacian seminarion kun siaj eksterlandaj gastoj okaze de la 1-a de majo en Bruselo. Nekutime, inter la dokumentoj disdonotaj al la partoprenantoj estos ***esperanta versio!*** Pro tio nepras, ke helpu la samideanaro enkoputiligante (senpage) la koncernajn tekstojn, prefere -tamen ne ekskluzive- sur PC-DOS aŭ Vindoza Word Perfect aŭ Word. La tuto devus esti liverata antaŭ la 1-a de majo al la E-fako de Belgia Laborpartio (BLP): BLP-Amikaro, 171, Bd. Lemonnier, BE-1000 BRUSELO, Belgio. Faksilo: – 32 2/513 98 31; Email: solidaire@gn.apc.org. La voluntuloj bonvolu kontakti ĉi tiun adreson.

# Literatura angulo

## *Vortoj de Valo, kun studoj kaj artikoloj.*

Interesajn artikolojn oni trovas pri SAT kaj sennaciismo en malgranda, ruĝa libro. *Valo* estas pseŭdonimo de Rajmundo Laval, franco kiu esperantistiĝis antaŭ 84 jaroj! Li konis persone Lantin kaj Rajmundon Schwartz, kiujn li helpis en ilia agado. Valo ankaŭ estis sekretario de la Literatura Komitato de la Sennacieca Asocio Tutmonda, kies ano li ankoraŭ estas.

Li kontribuis ege, kaj ankoraŭ kontribuas, al diversaj revuoj esperantaj, kaj la libro kiun mi nun komentas estas elekto el siaj studoj kaj artikoloj aperintaj en *Sennacieca Revuo*, *Sennaciulo* kaj *Laute!*, kiuj estas revuoj sufiĉe konataj pro siaj ne komformismaj celoj kaj vidpunktoj.

La libron oni dividis en tri planoj: I studoj, II artikoloj, kaj III *Vortoj*, tio estas, malgrandaj artikoloj -kelkaj estas malpli longa ol unu paĝo!

La unua parto enhavas kvar tre legindajn -eĉ legendajn- *studojn*, tio estas, longajn artikolojn. Estus tre konvene legi la duan, *Senmetoda babilado pri la aŭtoro de la* ***Diskurso*** *pri la* ***Metodo***, kvankam ĝi estas tridek sesjaraĝa, ĉar kiam vi legas tion, kara leganto, estas la 400ª datreveno de la naskiĝo de *Renée des Cartes*, la homo kiu unue diris *Mi pensas, tial mi estas.*

Tiu eta ruĝa libro donas perspektivon de esperantista vivo aktiva, kaj resumas multajn vidpunktojn esperantismajn, kiel sennacieco, esperantismo, mondismo, kulturo, zorgo pri arto.., kaj eĉ erotismo. Se oni demandas al mi pri esperanta kulturo, mi elkore dirus: legu *Vortoj de Valo*. Mi honeste opinias, ke estas tre klara resumo de esperantistaj aferoj.

*Armand Delacroix*



## Ne nur por geprofesoroj...

Ni trafis ŝancon legi la originalo de la libro ***Sobre la responsabilidad civil y penal del profesorado*** (pri respondeco civila kaj krima de geprofesoroj), verkita de S° Juan Antonio Cabezos Martínez. Tiu ĉi libro ne ankoraŭ estas publikigita, kaj tial la legantoj de ***Kajeroj el la Sudo*** estas la unuaj kiuj konas pri ĝi. La libro estas por geprofesoroj, kaj respondeco estas studenda pere de sentencoj juĝistaj. Ili estas tre aktualaj, kaj la aŭtoro prezentas sentencoj de diversgradaj Tribunaloj. Ili ĉirkaŭbrakas ĉiu ebla supozoj, de studentino kiu suferas akcidenton en Irlando, studento kiu atakas alian, instruisto kiu ekas sekse siajn instruitojn, lernanto kiu mortas en rivero, aŭ infano kiun hundo mordas. La libro vere estas pionira pri la temo en Hispanio, kaj -kio estas pli grave- estas pensita por profesoroj kaj gepatroj, kun facila legado kaj komprenado.

*Rosa Onofre*

# EL DESAFÍO DE LAS LENGUAS, de Claude Piron

Antaŭ kelkaj monatoj mi legis la lastan verkon de Claude Piron, ***Le défi des langues***, kaj mi trovis, ke estas tempo porĉesi klinitkape laŭiri. Ni esperantistoj havas ŝlosilon por malfermi internacian diskomprenon, sed ni ankaŭ devas ekspliki tion al neesperantisto obstina. Ĉiuj argumentoj kaj kontraŭargumentoj kiujn ni esperantistoj suferas iam estas sufiĉe bone eksplikataj en tiu ĉi libro. Ĝi estas vere mensa manĝaĵo por konvikita esperantisto. La solan problemon kiun tiu verko havas estas la lingvo: ĝi estis verkita france. Tial mi tuj tradukis en la hispanan, por ke multaj samideanoj de mia lando kaj Sudameriko povos profiti la valoran verkon de Profesoro Piron. Mia traduko estas korektita kaj aprobita de la aŭtoro mem, kaj baldaŭ estos eldonita. Tamen, estas mona problemo nun, kaj se samideano kredas, ke li aŭ ŝi povas helpi, mi plezure ricevos lian aŭ ŝian leteron!

Profesoro Piron priskribas la plej multekostan malsanon en la mondo: La Sindromo de Babelo; kaj ankaŭ diskutas pri la diversaj flegadoj de la malsano, kaj ankaŭ la sola kuracilo.

La strukturo de la libro estas jene:

1 Lingva internacia komunikado: ĉu patologia mastrumado?

2 La problemo. 3 Mitoj kaj realoj.

4 Pli facile ol dirite.

5 Provsolvoj.

6 Lingvo, nerva sistemo kaj homa psikologio.

7 Solvon meritindan rigardadi.

8 Rezistanco: normala elemento de ĉiu neŭrozo.

9 Kelkaj ekzemploj de raciaĵoj.

10 Personoj, entute, perfekte normalaj.

11 Pilota projekto.

12 Kelkaj raciaj proponoj.

Mia opinio estas, ke estu plej bono se la aŭtoro mem esperantistigu la verkon, por ke samideanoj el la tuta mondo povu profiti tiun ĉi kopernikanan verkon pri ekscio de Esperanto ene de la esperantistaro, kaj ekster ĝi pere de postaj tradukoj en multajn aliajn lingvojn ele de la esperanta versio. Tamen, kelkaj ekzemploj devas esti ŝanĝigitaj por adapti sin al la tradukotaj lingvoj.

Se vi volas pluan informon pri la hispana versio, bonvolu skribu al Poŝtkesto 4461, E30080 MURCIA, HISPANIO.

*Jesuo de las Heras*



# Debatindaĵoj K.F.D.

Kutime geesperantistoj devas senofendiĝi kiam ili aŭdas stultaĵojn pri Esperanto. Lastsomere mi sidis kaj pripensis aron de sensencaĵoj pri tiu temo, kiujn iam oni demandis al mi, kaj produktis eseon kiu, kvankam elpensita por Internet kiel FAQ (*Frequently Asked Questions*, tio estas: Kutime Faritaj Demandoj), necesus diskuti ĉi tie, por ke esperantistoj el la tuta mondo povu plejbonigi miajn argumentojn, kaj helpi klarigi la kutiman demandaron -eĉ stulta! Mi titolis mian laboron *La Dudek plej demanditaj temoj*. Ili estas jene:

1 Kio estas Esperanto?
2 Se Esperanto estas tiel bona, kiel oni ne adoptis ĝin en la tuta mondo?
3 Esperanto estas nulo!
4 Esperanto estas okcidenta eŭropa lingvo, same kiel la angla. Ĉu ili ambaŭ ne estas samkiel malfacilaj por orientano?
5 Esperanto estas artefarita lingvo.
6 Por ke lingvo funkciu, ĝi devas esti natura, tio estas, ĝi devas esti aperinta en konkreta lando el konkreta kulturo.
7 Esperanto estas kodeto senaspira kiu nur taŭgas por infana ludo, sed ne eblas subteni literaturon aŭ larĝan kulturon, kiel tiuj de la angla aŭ hispana, ekzemple.
8 Esperanto estas lingvo kiu ne evoluas.
9 Se Esperanto evoluas, okazos malsimilaj dialektoj kiuj post kelkaj jaroj iĝos diversajn lingvojn, kaj tiel la lingva barilo supreniros denove.
10 Esperanto estas idiomo sen kulturo.
11 Neniu parolas Esperanton. Ĝi estas fuŝita projekto.
12 Esperanto estas utopio.
13 Kie oni povas lerni Esperanton?
14 *Esperantisto* sonas kiel *Adventisto* aŭ *espiritisto*. Ĉu **Esperanto** estas sekto?
15 Kiuj estas la esperantistoj? Kio estas ili?
16 Ĉu vi opinias, ke iam Esperanto estos altrudita en la tuta mondo?
17 Kiuj estas la malamikoj de Esperanto?
18 Se la malamikoj de Esperanto estas tiel povaj kaj tiel malfaciligas la aferon, kial zorgi por lingvo kiu neniam estos adoptata tra la mondo?
19 Mi lernus Esperanton, sed se strata persono ne parolas tion, pri kio ĝi servos al mi?
20 Se ĉiuj malaprobas la ideon de Esperanto, ili sendube pravas...

Eble vi havas bonan respondon por iuj aŭ ĉiuj demandoj. Min plezurigos via letero enhavante ilin... La redakcio konsentis publikigi la respondojn laŭ la ebleco de spaco, kaj citos la kontribuintojn. Mi komencas ĉi foje prezentante mian respondon por la unua:

1 **Kio estas Esperanto?** *Esperanto* estas pseŭdonimo kiun adoptis la kreinto de la *Internacia Lingvo*, kiun li ankaŭ uzis por signi la unuan gramatikon de la lingvo en 1887. Kiam la tempo forpasis, oni konis la lingvon kiel *la lingvon de Doktoro Esperanto* aŭ simple *Esperanton*. En tiu lingvo tio volas diri *tiu, kiu esperas* (el que espera),kaj estas propra nomo. Tial hispane oni devas skribi sian unuan literon per majuskulo, same kiel Sanskrito (Sánscrito) aŭ Sŭahilo (Suajili), kvankam tion oni ne faru france aŭ angle kaj alilingve, ĉar la nomo estas vere adjektivo.

Esperanto aperis kiel neŭtrala kaj internacia lingvo por superi barilojn lingvajn kaj kulturajn, kaj havas nur 16 gramatikajn regulojn kaj nek unu escepton. La skribado estas tute fonetika, kvankam estas ses literoj kiujn komputiloj ne ankoraŭ povas skribi pro kulpo aŭ malzorgo de programistoj kiuj faras operativajn sistemojn, kvankam kelkaj -kiel Vindozo- jam povas produkti ilin.

**Daŭrigota de** ***Olga López***

# 55ª Hispana Esperanto Kongreso

**12ª de Julio**: a) Akcepto de la gekongresanoj kaj disdonado de la materialo. b) Interkona vespero.

**13ª de Julio**: a) Oficiala Solena malfermo. b) Protokolaj salutoj de OKK, HEF Prezidanto kaj reprezentantoj de Hispanaj Komunumoj. c) Parolado de la HEF-Prezidanto. d) Komuna fotografado. e) Jurnal-rado. f) Kunveno de HEF-Estraro kun Grupo-delegitoj. g) Muzika poem-koncerto.

**14ª de Julio:** a) Labor-kunvenoj (fakaj). b) Ekzamenoj de esperanto-lernantoj. c) Projekcioj pri la lastaj Universalaj E-Kongresoj publike prezentitaj en la hispana lingvo al ne esperantistoj. d) Internacia Seminario pri *La Gejunuloj en la Inter-Kultura Eŭropo*. e) Internacia seminario pri *Labora situacio de la virinoj*. f) Muzika Kanzon-koncerto de *Solo*. g) Folklora Murcia Festo.

**15ª de Julio:** a) Tuttaga ekskurso: vizito per buso al San Javier kaj San Pedro del Pinatar, enŝipigo kaj sekva vizito al *Malgranda Maro kaj* siaj insuletoj. Elŝipigo en La Manga kaj post ĝia vizito, tagmanĝo en Cartagena. Posttagmeze vizito al La Unión, Cabo de Palos kaj reveno al Murcio. b) Ebla kanzon-koncerto de regiona grupo. c) Libera nokto.

**16ª de Julio:** a) Turisma vizito al Murcio. b) Kunveno de Asocioj kaj Fakoj. c) Ĝenerala Asembleo de HEF. d) Konkludoj kaj proponoj el la du Internaciaj Seminarioj. e) Prelego en la Hispana Lingvo. f) Oficiala Bankedo.

**17ª de Julio**: a) Duontaga ekskurso. b) Laboraj kunvenoj. c) Prelego en Esperanto. d) Oficiala Fermo de la Kongreso. e) Adiaŭo.

NOTOJ.- 1) Dum la kongreso ankaŭ okazos ĉiutage:
- Elementa Esperanto-kurso.
- Libro-servo.
- Ekspozicio pri Esperanta-materialo.

Ankaŭ eblas organizi postkongreson por ĉiu persono deziranta ripozi kelkajn tagojn ĉe strandoj de *Malgranda Maro*.

## Loĝejoj por la kongreso

Kontaktu rekte kun al Agentejo *Viajes Diseño*, Avd. Libertad, 6 blq. 1; 30009 Murcia. Tfn. 968 20 15 00 (Faksilo: 968 20 03 20.

## Aliĝiloj

Kongresano: 3500 pesetoj, Hefano aŭ eksterlandano: 3000, junulo (ĝis 30 j.) aŭ kunulo: 2.500. Kontaktu la jenan adreson:

55-a Hispana Kongreso de Esperanto
Asociación Socio-Cultural *Cielarko*
Gregorio Martinez Montesinos, 3
30580 Alquerías - Murcia.

**Kongreskonto:**

Caja Rural de Almería, konto nº 3058-0250-83-2720-00073-6. Indiku KONGRESO. Plaza Alejo Molina. 30580 ALQUERÍAS. MURCIA.

**NUR POR HALEANOJ** oni eblas arangi tre konvenan loĝadon kaj manĝadon po 3500 pts. tage dum la Kongreso de HEF. Kontaktu la redaktoron rapide, ĉar povas manki loko!

## Novajoj

**Esperanto-Klubo Akademio Internacia de la sciencoj de San Marino** organizas **Ripozan renkontiĝon** (23/29-05-96), **Xª Esperantajn tagojn** (02-06-1996) kaj **Polan Ais-Sesion** (27-05 al 02-06-96) en Staszow. Adreso: Esperanto-Klubo; Parkwa 6, PL 28-200 Stasów, Polujo. Tfn. 48 (15) 64-41-12.

**Monda Turismo** invitas al studado de Esperanto, turismo kaj kulturo en Bydgoszcz, Pollando. Ili organizas kursojn pri **Turisma Informanto**, **Turisma Esperanto-ĉiĉerono** kaj **Gvidanto de turismo kaj kulturo kaj instruisto de Esperanto**. La kursoj daŭras 3 jarojn; sed se oni ne povas ĉeesti tiom longe, estas *aŭtuna sesio* (21 septembro-29 septembro), *vintra sesio* (25 januaro - 9 februaro 1997), kaj *printempa sesio* (26 aprilo ĝis 4 majo 1997). Informoj je Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo de **Monda Turismo**; Strato M. Sklodowskiej-Curie 10; PL 85-094 BYDGOSZCZ, Pollando, tfnº +48.52.460082.

# LA HISPANA KAJ LA ANGLA

D^ro José Luis Pérez Óvilo

***La Ministro pri Klerigado, la Ambasadoro de Unuiĝinta Reĝlando kaj la Prezidanto de British Council /britiŝ kaŭnsil/ ĵus rubrikis akordon per kiu la hispanaj lernantoj ricevos dulingvan angla-hispanan instruadon ekde sia 4-jariĝo. La selektadon de la profesoraro faros British Council, kaj la Ministerio respondecos pri la elspezoj. La celo estas ke la lernantoj atingu sufiĉan regon de la angla kaj konon de la historia, socia kaj politika realoj de Unuiĝinta Reĝlando.***




*-Domaĝe ke ne ekzistas reciprokeco inter la kulturoj!*

-Stultas vi rezonante, Malgrandegulo. Tia reciprokeco estas malnepra. Ĉu vi ne rimarkas kiel elstariĝas la silueto de la Granda Bonfaranto? Ĝi elaĉetos vin je la lacigaj ekzercoj de la rezonado kaj pripensado kaj, precipe, je la kompreno estigita de la decidoj. La Granda Bonfaranto al vi diros tion, kio estas bona kaj kio estas malutila, ĝi montros al vi la vojon al la konveno.

*-Kaj kio al la liberpensado kaj la rajto de la popoloj elekti siajn proprajn sortojn?*


-Vi daŭre restas en nebulo mensa, Minimulo, kaj vi persistadas en via blindeco. La homoj ne plu povas permesi al si vanajn ideojn kaj malutilajn utopiojn. La mondo devas esti gvidataj de la leĝoj de la Ekonomio garantiitaj de la moralo de la Granda Bonfaranto.

*-Tiel, la ceteraj kulturoj estos malutiligataj kaj subpremataj.*

-Certe, Vermo, sed ĝi ne temas pri hipotezo, male ĝi estas nepraĵo, kiun vi ĉiuj komprenos kun sia

**Ĉu lingva libereco?**

grandeco kaj akceptos ĝin pro sia neevitebleco. La volonta kaj iompostioma rezigno je via kulturo estas io, kion vi apenaŭ rimarkos, ĉar ĝi estos anstataŭigata de alia, ankaŭ okcidenta kaj pli perfekta, kio plenĝuigos vin.



*-Kaj kio okazos pri nia lingvo? Ĝi estas granda lingvo kiu apartenas nin kaj estas de ni amata.*

-Vi denove eraras, Primitividulo. Pro viaj eteco kaj provincanismo, via malamplekso de kriterio gardas vin senmova en la pasinteco kaj malkapabligas vin kompreni ke tio, kion vi diris estis iam, sed ĝi ne plu estas. Kial vi rifuzas akcepti, ke via lingvo estas nune tiu de la marĝenuloj kaj ĉifonuloj el Ameriko? Via lingvo nur pluekzistas pro senkontrola naskigado, ĝi estas la lingvo de la malriĉuloj, kiuj senhavos privilegiojn okaze de la Nova Paco de l' Bonfaranto. Ĝi estas, ankaŭ, primitiva kaj taŭga por la spekulativado kaj la bagatelaĵoj, sed ĝi estas tute senutila por la sciencoj kaj teknologioj de la 21ª jarcento. La angla estas la lingvo, la kulturo, la esto kaj la vehiklo de la Bonfaranto.

*-Miaj samnacianoj neniam, neniam akordos kun viaj streboj.*

-Via enreviĝo malebligas vin la materiecon de tiu fakto. Ili ja priakordos ĝin, Ignorantulo. Dum la 55 jaroj de mia restado ĉe via lando mi estas montrinta la mirindaĵojn de mia lingvo, kaj ĉiuj viaj estraroj: tiuj de la Diktaturo, tiuj de la Demokratiiĝo, kaj tiu maldekstrisma



*kiu nun vin gvidas*, jam agnoskis ĝin. Via Ministrino pri Kulturo ĝin laŭdas kaj via Ministro pri Klerigado ĝin altrudas kiel devigan studoobjekton. La impreso de propra sengraveco montrata de la katedruloj kiuj ĝin ne regas, faras kontraston kontraŭ la memsufiĉo emanata de la Gvidantaj Gurkoj kiuj jam komprenis kie troviĝas la deveno de la kuraĝiĝado; la anglidaj vortoj disgutas la vakuajn sentencojn de viaj komunikistoj, klerigante kaj sencoplenigante ilin; kaj via gento, ignoranta kaj kruda, ekde sia penssimpleco proklamas la grandiozecon de la *Yale University* (Universitato de Ĝejl) portante kamizolojn dum ili trinkas *Coke*. Agnosku, ke neniu plu nomiĝas *Manolo*, *Pepe*, *Paco*, sed *Manolo's*, *Pepe's* kaj *Paco's*: jen la pruvo de la tuŝebla realo neevitebla.

*-Mia popolo aĝas plurjarmile, havas sian orgojlon kaj ne toleros esti senposedigata de sia spirito.*

-Vi deliras, Retorulo, ekde via senpraveco. Rigardu kaj aŭskultu viajn registojn kaj vi konstatos, ke la orgojlo kaj spirito de via gento, kiuj sen povo estas nenio, jam estas submetigitaj je la servo de la Nova Ordo de la Bonfaranto. De nun ne necesos pluaj militoj, sufiĉos nia sola ĉeesto. Ju pli frue vi agnoskos vian rolon de milvo, des pli frue vi atingos rekompencon el la Bonfaranto kaj des pli frue vi estos kompreninta ke pli bonas esti ruinaĵo restarigita ol rubo.



# Ekonomio

## Planediĝo

Ne estas strange, ke la nuntempa sindikatismo drivas sen orientiĝo. La klaslukto naskiĝis je la fino de la deknaŭa jarcento en la sociaj cirkonstancoj de industriiĝo meze de nehoma kapitalismo. Tiam la metia laborado estis ruinigita de la kapitalistaj entreprenoj,tiel same, kiel nuntempe la tradicia agrokulturo estas anstataŭata de agrokulturaj entreprenoj kaj la familiaj komercejoj de supervendejoj.

Tiam, en la pasintaj jarcentoj tiel same la financoj, kiel la industriaj entreprenoj ordinare havis naciajn kadrojn. La doganoj baris la liberan cirkuladon de varoj kaj eĉ la agrokulturajn produktaĵojn. Krome la precipaj baroj ankoraŭ estis geografiaj. La transporto kaj la komunikado estis malrapidaj, kaj la industriiĝo disvolviĝis sub dogana protektado.

La tiama industrio kun malrapida ekspansio certigis la kapitalisman ekspluatadon. La fina prezo de la varoj konsistas el tiuj de la krudaj materialoj, la laborhoroj de la la laboristoj, kaj la ĝeneralaj enspezoj, kio donis la varkoston. Inter la kosto de produktado kaj la vendoprezo estis certa diferenco nomata plusvaloro, kiel signo de ekspluatado. tiam, tiu vendoprezo povis esti fiksita de la entreprenoj, ĉar tiuj nur devis konkurenci kun la metia prezo. Tial ke la industria prezo estis pli malalta ol la metia, la metioj bankrotis kaj la industriistoj riĉiĝis.

Nuntempe aperis la nuntempa transporto, la tuja komunikado kaj eĉ la telematiko, kaj nia mondo fariĝis unu granda sola vilaĝo. Se la industrioj restus naciaj, ne eblus la industria ekonomio de skalo. Tial, ke neniu nacio povas fariĝi aŭtarcia sen disfalo de la vivnivelo, la internacia komerco fariĝas nepre necesa. Nuntempe la prezoj de la varoj jam ne povas esti fiksataj de la entreprenistoj. Ilin fiksas la konkurenca merkato. La plusvaloro eĉ povas esti negativa kaj la entreprenoj bankrotis. Tiel same en nia lando kiel en la okcidenta Eŭropo la teksa industrio preskaŭ malaperis. En orienta Azio kaj en subevoluintaj landoj pro la malaltaj salajroj produktas malplikoste.

La financo internaciiĝis. Grandaj entreprenoj estas supernaciaj. Tiu internaciiĝo ne estas sekvata de adekvataj internaciaj institucioj por bremsi la spekuladon. Se la ekonomio planediĝis, socie kaj politike okazas la kontraŭo. La nombro da ŝtatoj plimultiĝas kaj restas senpovaj antaŭ la internaciaj financoj.



La internacia financa kapitalo investas en tio kaj kie povas ricevi pli grandan rentumon, sen tio, ke la registaroj povu ion fari. La internacia mono estas la dolaro, sed ankaŭ estas la nomataj eŭrodolaroj, kiuj restas ekster la kontrolo

de Usono. Tiu kapitalo apartenas al petrollandoj ankoraŭ sub absolutaj riĉegaj regantoj kaj mizeraj regatoj. La monda ekonomio restas ĥaosa. Al prosperoj sekvas ruiniĝojn aŭ kontraŭe, ĉio restas provizora, tiel same la laborlokoj kiel la entreprenoj, ambaŭ sub la financa kapitalo. Ofte malgrandaj entreprenoj tiel same la laboristoj, kiel la entreprenisto estas ekspluatataj de la financa kapitalo. La ideoj de la pasinta jarcento fariĝis ekstertempaj.

Kion fari? Revivigi la nomatajn proletajn diktaturojn ne estas solvo, ili fiaskis eĉ el ekonomia vidpunkto. Nek proletajn diktaturojn nek burĝajn diktaturojn, sed liberalan demokration kun plena regado de la homaj rajtoj.


Fermiĝi en aŭtarciojn kondukas al ruiniĝo. Forlasi la ekonomion de merkato per ŝtata planado alportos neefikajn entreprenojn, kiuj malaltigas la vivnivelon. Ankaŭ la ekonomio de merkato ne alportos ekonomian ekvilibron pro tio, ke estas senkompata konkurenco por la merkatoj. Eŭropo, Usono, Japanio, Koreo, Singapuro, havas modernajn industriojn kun eble altaj vivniveloj, kontraŭe okazas al subevoluintaj landoj, kies entreprenoj apartenas al la financa internacia kapitalo kaj la tieaj laboristoj laboras malmultekoste kaj ne havas socian asekuron. Eŭropo nur povas konkurenci per produktoj de alta teknologio ne produkteblaj sen scienca kaj teĥnika altnivelo kaj supera organizkapablo. Eble, kiam en la subevoluintaj landoj altiĝos la vivnivelo, la monda komerco pligrandiĝos kaj la ekonomio ekvilibriĝos tutmonde en ĉiea pli alta vivnivelo. Kaŝe dirite, Eŭropo devus sendi revoluciulojn al tiuj landoj por ke tie oni altigu la salajrojn.

Se la ekonomio jam planediĝis, ankaŭ devas planediĝi la organizo de la socio. La nuntempaj ŝtatoj estas tro grandaj por solvi la lokajn problemojn kaj senpovaj por solvi la tutmondajn. Tio aranĝebla loke, loke devas esti aranĝita, tio regiona, regione, kaj tio tutmonda per adekvataj organismoj tutmondaj, demokratie kaj kun la regado de la homaj rajtoj. Tia devas esti la celado por la nuntempo kaj por estonteco.

La ekonomio de merkato estas efika laŭ ekonomio, sed drastre socia. Bazita sur la konkurenco ĝi fariĝas nesolidara, suferas sendungiteco kaj generas marĝenulojn kaj ĉio tio estas korektenda. Ja la ekonomio devas servi ĉiujn, kaj ne la homoj al la servo de la ekonomio.

Eble la plej bona vojo al la estonteco povas esti socia ekonomio de merkato. Libera ekonomio, sed kun reala socia asekuro, kiu forigu la mizeron kaj ebligu, krom altan vivnivelon, ankaŭ altnivelan ĝeneralan kulturon, nepra kondiĉo por nova fazo de planeda civilizacio.

*Giordano Moya.*



# Vizito de Nobelpremiito al Murcia

*Je la 2ª de marto Profesoro R. Selten kaj sia edzino vizitis nian urbon. Li venis por prelegi ĉe Universitata Seminario pri **Teorio de Ludo**, kaj ankaŭ diri prelegon al ĝenerala publiko, enkondukante sian dumvivan laboron **en Esperanto**. Tion farante, li faris historion, ĉar estis la unua fojo kiam oni uzis Esperanton por universitata prelego al ĝenerala publiko. Profesoro Selten pruvis al ĉiu ajn, ke Esperanto estas ja viva kaj bone funkcias, kaj ke ne estas esotera kodo, sed homa kaj klara lingvo.*


## I

### Pres-Konferenco

Je la 5ª de marto, Profesoro Selten donis preskonferencon. ***Kajeroj el la Sudo*** ankaŭ esti tie, kaj registris demandojn kaj respondojn. Estis jene:

*1 Ĉu politikistoj interesis pri viaj teorioj?*

La Teorio de Ludo malsimilas politikan sciencon. Politikistoj profitas politikajn scienculojn. Sed sendube, ili faras politikajn decidojn sekve de mia teorio.



*2 Kio gravas estas, ke homo ne estas tute racia: ĉu oni progresas tiusencen?*

La Teorio de Ludo estis bazita sur konduto racia. Decidantoj ne ĉiam estas tute raciaj, kaj kion ili kutime faras, estas rigardi nian teorion abstrakte.

***3 Kial teorio de ludo, anstataŭ de Decido aŭ de Veto?***

La Teorio de Decido povas taŭgi por nur unu persono. **Ludo** signifas interagon inter kelkaj personoj. La vorto estis inspirita de ludo de povo, kaj estas grava parto de edukado. Newman uzis tiun nomon, ĉar li analizis tablajn ludojn unue. Tio estis nur la inspiro de la pincipo, kaj poste la Teorio de Ludo estas uzata ne multe por tablaj ludoj.

*4 Ĉu vi povas pritaksi la procezon de Mona Unuiĝo?*

Unue, mi devas diri, ke mi ne estas sperta en makro-ekonomio. Tamen, mi havas fortan opinion pri la afero. La unua argumento estas, ke ĝi povas esti malpli stabila en Germanio. Oni devas produkti pli ol antaŭe.

La dua argumento kontraŭ la Mona Unuiĝo estas, ke ekonomikaj cirkonstancaroj malsamas inter la landoj de Eŭropa Komunumo. Tial estas diversaj devizoj; sed Eŭropan Unuiĝon

oni ne povas atingi sen mona unuiĝo. Tio signifas rekte investi aliajn devizojn. Kompreneble, ĝi ne povas esti kompletigita.

Sed en Germanio estas du argumentoj pluaj kontraŭ Eŭropa Mona Unuiĝo: 1 danĝero de inflacio en la lando, kaj 2 la Eŭro estos malpli stabila ol la marko. Tamen, mi ne kredas tion, ĉar la Eŭropa Banko funkcios same kiel la *Bundesbank*. Ĉiu landa cirkonstancaro estas malsama al alies ajn. Tial la mona politiko devas esti malsama. Se estas unuiĝo, ne povas esti malsama politiko. Sed estas malsamaj problemoj ene de sama lando, eĉ ene de sama regiono de sama lando: en Germanio estas malsamoj inter la orienta kaj okcidenta partoj de la lando, kaj neniu petis alian devizon. En Italio malsamas la norda kaj suda partoj de la lando, kaj ne estas du liroj. Tiu argumento malfortiĝas. Sed, kontraŭe, se estas nur unu monero, malaperas psikologiaj bariloj. Kaj ankaŭ malaperas kostojn de ŝanĝoj de mono, kio estas bona por malgrandaj entreprenoj.



*5 Ĉu la rezulto de la hispana baloto faros pli grandan stabiligon de la ekonomio, aŭ ĉu ĉio restos same ol antaŭe?*


Mi ne opinias, ke estos pli da malstabiligo, ĉar koalicio devigos disciplinon. Mallongaj plimultoj povas krei pli stabileco. Sed nun mankas al mi plia informado. Ebloj estas multaj nun. La Teorion de Ludo oni povus uzi por scii kiujn koaliciojn oni povus fari nun. Sed necesus labori unu tagon pri ĝi, ĉar estas 11 partioj enroligitaj.

*6 Ĉar la angla estas tiel disvastigitaj hodiaŭ, kiajn perspektivojn havas Esperanton por disvastiĝi?*

La angla estas tre grava, kaj se scientisto volas, ke oni legu lin, li devas verki angle. Antaŭ ne multe da jaroj la franca estis la grava lingvo, kaj ankaŭ la germana en alia tempo. Nun la angla havas pli ekonomia povo. Mi ne opinias, ke la angla konservos tiun pozicion ĉiam. Plej bono estas havi lingvon kiu estas facile lernata. Esperanto estas multe pli facile lernata ol la angla. Ĝi ne estas ies nacia lingvo. Tio estas avantaĝo en scienca kongreso. Mi ne parolas la anglan. Mi parolas la *Internacian Anglan*, malsama ol la usona aŭ brita angla. Se tiu dialekto de la angla devenas la *standard* anglan, la britoj kaj usonanoj devas adapti siajn lingvojn al ĝi. Esperanto naskiĝis por iĝi dua lingvo, tial ĝi estas bonega pretigo por alia lingvo. Ekzistas eksperimento pri franca kaj esperanta lingvoj: aro da infanoj lernis Esperanton dum du jaroj, kaj poste francan dum du jaroj pluaj, kaj samtempe alia aro da infanoj lernis francan dum kvar jaroj. Tiuj, kiuj lernis Esperanton regis la francan pli bone. Estas pli malmultekoste lerni Esperanton unue. Tiu eksperimento estis farita en Finnlando, Hungario kaj Svedio. Ĝi pruvis, ke Esperanto estas tre bona ilo por lerni alian lingvon.

# Atestoj: Post 10 jaroj

Simile al tio kiel antaŭe oni diris "antaŭ la milito", "post la milito" nun ni parolas pri la Katastrofo en Ĉernobil. Pli ĝuste estas, ke ni ne parolas pri tio kio estis *antaŭ*, ĉar tro grava estas tio, kion ni havas *post*. Nun preskaŭ neniu infano en Kievo naskiĝas sana; 65'4% de la novnaskitoj estas serioze malsanaj. Ĉu pro nesufiĉa manĝado de la patrinoj (ĉar bonaj manĝaĵoj estas neatingeble multekostaj)? Jes. Pro tute malbona prizorgo dela gravedaj virinoj flanke de la kuracistoj (ĉar sia laborpago estas malgranda kaj ili ne volas sindone labori, pro tio ke la kuraciloj estas ne aĉeteblaj pro siaj tro alta kosto)? Jes.



Sed plej multe gravas la post-sekvoj de la katastrofo...

Persone mi eksciis pri ĝi ne la 26-an de aprilo, 1986 sed la 30-an, tute hazarde. Iu diris ke apud Ĉernobil okazis iu averio. Ofte ie io okazas. Ni tute ne imagis la veron. Sabate kaj dimanĉe ĉiuj multe promenis laŭ la stratoj, en parkoj. La 1-an de majo estis granda tuttaga festo en la urbo kiun partoprenis kiel ĉiam tre multe da infanoj kaj plenkreskuloj. La 3-an - 4-an de majo kiam konserviĝis tre danĝera situacio en la aero ĉiuj denove multe promenis. La 5-an - 6-an estis granda sporta festo en la centro de la urbo, spekti kiun venis ankaŭ tre multaj... Nur poste ni ekaŭdis ke dezirindis ne eliri el la domo, eĉ ne malfermi la fenestrojn.

Mi manĝis la venenigitan manĝaĵon, ni spiris la malsanigan aeron, ni ne sciis kiel necesas agi.

Post tio la rezulto: 100-obliĝis nur kancero de tiroido, abundas aliaj kanceroj, preskaŭ ĉiuj personoj havas la plej malaltan imustaton. La gazetaro donas novajn kaj novajn faktojn. Koran dankon diras ukrainoj al ĉiuj alilandanoj kiuj helpis kaj helpas al ni. Tuj kiam pasis nur kelkaj tagoj post la katastrofo al mi telefonis tute neko-nata espe-rantisto el Germanio, kaj proponis sendi kuracigajn produktojn. Mi devis respondi al li ke ni ne bezonas ĉar ĉion havas -ja KGB aŭskultis ĉiujn

telefonparolojn kaj ne lasus nin trankvile vivi se mi dirus la veron al alilandano. Ankaŭ en leteroj iuj esperantistoj proponis helpon. Ni devis respondi ke ni ne bezonas ĝin. Tamen ni bezonis! Mia nevo estas grave malsana kiel plimulto el la infanoj. Mia ĝemelfrato Vjaĉeslav Pogorelij, televida laboristo, laboris en la loko de la averio dum kelkaj monatoj, nun li estas nelaborpova invalido, suferanta de sia tre malbona sanstato, kaj neniu kuracisto povas al li helpi.

Kiel okazis ke la katastrofo estis ebla? La veron ni neniuam ekscios. Plimulto el la kievanoj opinias, ke tio okazis pro tio ke la landgvidantoj -Gorbaĉov, ministroj, ktp., devigis la laboristojn de la atomstacio labori haste kaj neakurate. Sed kiam okazis la katastrofo estis tiom multe da mensogoj flanke de Gorbaĉov kaj aliaj altaj ŝtataj personoj... dum unu nokto staris aŭtobusoj en urbeto Pripjatj (tuj de la atomstacio) kaj la gvidantoj dum longa tempo ne volis doni la permeson elveturigi la loĝantojn for... La soldatoj kiujn oni devigis helpi havis neniun defendveston, oni ne diris al ili ke estas malpermesite trinki akvon el la fontoj... Neniu estis informita pri la danĝero de promenoj en la unuaj tagoj...

Mi estas instruistino en lernejo. La infanoj kaj la instruistoj estas tre malsanaj. Jes, kulpas nur Gorbaĉov kaj liaj helpantoj. Sed nun, pasis 10 jaroj: kial la nunaj gvidantoj ne volas iom plilongigi la vivon de tiuj kiuj **defendis iliajn vivojn**? La respondo estas sola - ni havas ne taŭgajn gvidantojn. Ĉu iu volos ilin defendi se okazos iu alia katastrofo? Apenaŭ. Mortas mizere tiuj kiuj batalis ĝis la venko dum la milito. Mortas post tre malfacilaj malsanoj tiuj kiuj batalis kontraŭ la katastrofo.


Mi estas instruistino en lernejo

Tiuj bataloj estis similaj: la homoj fordonis sian sanon, siajn vivojn, ili ricevis malsanojn kaj mortojn.

Ni tre malofte rememoras kiel ni vivis antaŭ la katastrofo sed ni ĉiutage sentas la rezulton de la katastrofo.

Post 10 jaroj nur ni komencas ricevadi po iom la verajn informojn, sed... tro malfrue.

*Svetlana Pogorelaja,*
*kievanino*

# LA TAJFOREGNO DE MURCIA,

## El Lirikaj perloj de Al-Andalus,

de Antonio Marco Botella

La historio de ĉefurbo de la regno, Murcio, ne estis longa, kiam per teritorioj de la nunaj provincoj Murcio kaj Albaceto formiĝis la tajfo de Murcio. Fakte la ĉefurbo estis fondita ĉirkaŭ la jaro 831 de la tiama emiro de Al-Andalus Abd al-Rahman la 2ª (792-852). Tiuj teritorioj, ĉiam pretaj ribeli kontraŭ la povo de Kordovo, estis regataj de sinjoroj preskaŭ sendependaj ekde la tempo, kiam Daysam ibn Ishaq, sinjoro de Murcio kaj Ka-loksa, hel-pis la ribelon de Umar ibn Hafsun kon-traŭ la kordo-vaj emiroj.



Dum duono de la 11ª jc., la tajfon de Murcio regis la familio Banu Tahir, sed en la jaro 1078ª la ĉefurbon konkeris Ibn Ammar, veziro de la Sevila reĝo Mutamid, kun la helpo de loka sinjoro Ibn Raŝiq, kiu poste sendependiĝis ĝis la alveno de la almorabidoj. La regiono pasis de unu sinjoro al alia, ĝis unu el la idoj de la familio Hud de Saraqusto Abu Abd Allah Muhammad ibn Hud, konkeris Murcion en 1228ª, kaj, adoptinte la titolon Mutawakkil, nur en du tri jaroj konkeris iom post iom Almerion, *Játiva*, Alziron, Denion, Granadon, Jaén, Malagon, Kordovon, Sevilon, Algeciras kaj Ĝibraltaron. Danke al tiu sukceso li ĝuis grandan popularecon ĝis sia forpaso (1238a j.)

Dum la jaroj de tajfoj, la Murcia regno fariĝis grava fokuso de kulturo, scienco kaj poezio. Intelekta figuro senegala de tiu tempo estis Abu Bakr Muhammad Ibn Arabi, naskiĝinta en Murcio la 28ªⁿ de julio 1165. Oni konis lin ankaŭ per la honoraj nomoj *Muhyi al-Din* (Viviganto de la religio) kaj *Ŝayi al-Akbar* (la Granda Majstro). Tuj post la jaro 1172ª la familio de Ibn Arabi trans-lokiĝis al Sevilo, kie la knabo komencis sian edukadon, verŝajne tre kompletan: pri literaturo, religio, juro, poezio, ktp., kio ebligis, ke kiam li aĝis apenaŭ 20 jarojn, li estis jam sekretario de la gubernio de Sevilo.

En tiu tempo loĝis en Sevilo Muhammad Ibn Abdun,homo de altranga familio devenanta de la nord-afrika urbo Bugio,kiu donis sian filinon Maryan al la juna Ibn Arabi kiel edzino,sed baldaŭ li sin sentis inklina al sufismaj doktrinoj kaj decidis rezigni la materiajn ĝuon dela vivo kaj dediĉi sin al studado kaj verkado de piaj spritiaj doktrinoj, paralele praktikante aŭsteran asketan vivon

Daŭrigota...

# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: **Poŝtkesto 4461,**
**E30080 MURCIA,**
**HISPANIO**



*Honore al la Suda Laboristino*

**Depósito legal: Z-2398-88**
**Presejo: Anka Ĉus'**